Kamjar jam de longe certis ke liaj korespondoj estas kontrolataj. Por li ne estis surprizo ke tiuj ombroj tiom proksimas al li. Li jam sciis tion. Sed por Monik, kiu neniam spertis tiajn teruraĵojn, estis nun timiga momento. Ŝi vere timis...

En kelkaj siaj leteroj, Kuhjar klarigis pri siaj malliberiĝo kaj torturiĝo. En 1982 oni arestis Kuhjar'on kaj li estis en prizono dum ok monatoj. Ambaŭ fratoj sciis ke tio povas denove okazi ajnamomente. Neniu estas senkulpa krom "senkulpuloj"! Kiu estas "senkulpulo"? Neniu scias, krom Alaho kaj Liaj delegitoj sur Tero...

Estis nova mesaĝo:

"Eskapi el nia paradizo ne eblas! Vi sciis tion. La kondiĉoj de la reveno de via fraĉjo al via paradizo estas centmil eŭroj plus la korektado de la korespondoj. Baldaŭ vi ricevos pliajn informojn. Ne zorgu, ĉi-vespere ni kuiros fazeolojn por nia kara gasto.

Ne estis malfacile diveni kio okazis. Ambaŭ fratoj tre ŝatis fazeolojn kaj en siaj korespondoj faris multajn ŝercojn pri la manĝaĵoj faritaj el fazeoloj. La mesaĝo estis klara. Oni arestis Kuhjar-on. Oni scias eĉ pri la detaloj de ilia vivo. Oni postulas monon kaj politikan penton por liberigi la arestiton...

> *Ni bonorde ricevis vian leteron de 1/4/1979. Ha ha ha, verŝajne vi rapide integriĝis al via nova lando. 1/4/1979 egalas al nia 12/1/2538. Tie ĉi tamen nun estas 2/2/2538, kompreneble interne, ĉefe inter vi kaj mi, ha ha ha. Ekstere estas 2/2/1358. La jambarbuloj kaj iliaj novbarbuloj (novoriŝi > tiele nomis la du fratoj la novajn hipokritajn ŝajnkredantojn kiuj lasis sian barbon kaj faris ajnan krimon por alglui al la nova potenco. Riŝ = barbo) trudas siajn gustojn al ĉiuj. Oni regas kiel Alaho. Oni jam komencis ekzekuti homojn sen fari la juĝajn procesojn. Vi scias ke la onklo Fazel antaŭvidis tion. Ni tamen ne kredis! Mi pli miras ke eĉ komunismaj partioj kaj marksismaj organizaĵoj ĝojkrie aplaŭdas tiajn hommortigojn. Mi timas ke la komunisma paradizo estu io kiel islama paradizo. Mi ne plu fidas eĉ al miaj propraj okuloj. Tamen ne tro zorgu. Ni ĉiuj ĝojas ke vi sane atingis Eŭropon, la kontinenton de la libereco, frateco kaj egaleco. Mi esperas ke islamistoj ne konkeros ĝin baldaŭ ha ha ha! Agao tre kontentas pri via foriro. Li diras ke la onklo Fazel pravis; la paradizo estas post la morto! Nun ni sentas la flamojn de*

*la infero. Maman tamen tre maltrankvilas. Ŝi ade demandas sin kaj nin: "Kion manĝas mia fileto? Kie dormas li? Kiu lavas liajn vestojn? Se li malsaniĝos, kiu prizorgos lin? Ha ha ha, vi tre mankas al ŝi. Ja vi estas ŝia dorlotita plej aĝa filo! Ha ha ha..., kiom aĝa vi estas? Du minutojn pli ol mi? Ha ha ha, sed ne zorgu pri ni. Ni fartas bone. Almenaŭ ĝis nun. Estas grandaj tumultoj ĉie. La stratoj estas plenaj de diversaj politikaj grupoj. Ĉiu propagandas sian grupon. Mi fojfoje prenas senpagajn propagandilojn. Ankoraŭ neniu grupo minacas mian monujon ha ha ha... Ĉiuj salutas vin. Ne forgesu ankaŭ ĝui la vivon. Ni amas vin.*
*Via malpli aĝa fraĉjo.*